

N°174
avril
mai
juin
2016

LA INFORMILO

N° 174
aprilo
majo
junio
2016

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2016
Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj



ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 16€

Reta abono: 7,50€

kiel uzi-SKAJPO-TELEGRAMO-RETBABILEJO-SIDEPLAYER-ROKU-VK- kaj aliaj



Nouvelle TV en espéranto sur votre ordinateur, tablette ou smartphone

Dès l'entre-deux-guerres, des radios d'état de nombreux pays diffusaient des émissions en espéranto sur les ondes courtes. La qualité d'écoute laissait souvent à désirer, mais cela n'empêchait pas les mordus de tendre l'oreille et de suivre l'actualité de pays lointains.

Puis les ondes courtes ont laissé la place aux émissions par satellite, mais la crise économique obligea les rédactions nationales à annuler les émissions "non rentables".

Alors les bénévoles des quatre coins du monde se sont mis au travail et ont doté la diaspora espérantophone d'un bouquet de radios numériques.

Mais à l'heure du tout-internet il fallait aussi des images et après plusieurs essais de télévisions en espéranto diffusées par internet, un jeune espérantophone australien, Richard Delamore, lança en avril 2014 sa télévision mondiale. Ce jeune génie de la communication a créé une télévision qui présente à ses spectateurs les dernières vidéos Youtube en espéranto ainsi que des reportages sur les rencontres d'espérantophones à travers le monde. Tout ceci sans oublier les radios: un clic sur la radio de votre choix en page d'accueil et le monde s'ouvre à vous. Essayez: <http://novajhoj.weebly.com/>

79a Regiona Staĝo de Esperanto organizita de ESPERANTO-NANCY-54 la 22/23/24ajn de aprilo 2016 por



La organizadon de la ĉi-printempa staĝo transprenis la grupo de Nancy. Ĝi okazis en oportuna ferio-centro en Art-sur-Meurthe. Tri konstruaĵoj povis esti uzataj respektive por la tranoktadoj, la kultura parto kaj la diversaj manĝoj. Preskaŭ 50 personoj aliĝis el Francio, Germanio, Luksemburgio kaj Svedio. La programo konsistis el turismado, prelegoj kaj kursoj, kaj distraĵoj. Jam en la unua vespero eblis viziti Nancion por admiri la urbon dum-nokte. Dume, ceteraj partoprenantoj povis ĝui babiladon kaj ludojn en aparta salono, la knajpo. La sabata turismado celis viziton al la muzeo pri salo, nomata "Domo de la salo". La vizitantoj ricevis tie historiajn kaj teknikajn klarigojn pri la ekezkisto de salo en tiu regiono kaj pri la granda evoluo dum la jarmiloj kaj jarcentoj.

En la posttagmeze okazis la kursoj por komencantoj kaj progresantoj, ilin gvidis Catherine Hel kaj Edmond Ludwig. Jean-Luc Thibias prezentis la novajn librojn de la libro-servo.

La prelego de Istvan Ertl, pri Esperanto-Literaturo estis aparte interesa. Li montris



al la aŭskultantoj diversajn literaturajn verkojn. Li aparte emfazis la diversajn literaturajn stilojn. Ni konatiĝis kun:

Maskerado ĉirkaŭ la morto de Tivadar Soros

Poemon de Utnao de Abel Montagut el Poezio originala

Poemaron de William AULD BONAN MATENON, MAJSTRO



Nataŝa Bertse venis el Svedio kun sia filo Eric por prizorgi la vesperan koncerton. Komplica gitar-duopo sukcesis plezurigi la publikon. La Kantoj de Nataŝa aludis al foraj tempoj de Esperanto-tendaroj, kiam estis tradicioj kune kanti inter gejunuloj. Certe iom nostalgiaj, sed tiom agrablaj, plenaj je romantikeco, kun sopiroj pri junaĝo kiam koroj sopiras pri amikeco kaj amo. Unu el ŝiaj kantoj estis ankaŭ en la franca.



Post la koncerto ne ĉiuj sopiris al tuja enlitiĝo. Ĝuste la knajpo estis la taŭga loko por agrable babiladi ĉe biero aŭ teo. Iuj eĉ post noktomezo.

En la granda salono daŭre funkciis la libro-servo de la federacio. Dum la tri tagoj, eblis aĉeti librojn, gajni lotojn kaj subskribi antaŭmendon pri la nova du-lingva libro "Momo la Histriko".



Dimanĉe matene, la kursoj, la prelegoj denove plene funkciis. Refoje Istvan Ertl sukcesis kapti la atenton de la publiko. Post la paŭzo intervenis Catherine Kremer por paroli pri la historiaj sekvoj de la unua mondmilito. Tiaj teruraj kaj trakigaj eventoj ne povis resti sen rememorigoj. Plej gravaj monumentoj ja troviĝas en la regiono de Verduno kun la ostejo de *Douaumont*. Krome multaj aliaj monumentoj honorigas la mortintojn. Iom strange ŝi eĉ menciis ne-oficialajn monumentojn kontraŭ la militoj. Ĉu eble la militistoj ilin malabrobas?? La staĝo finiĝis kun la lasta tagmanĝo, tamen ne tute. Ĉar jam intervenis Ursula Niesert por informi pri la planoj de Bavelo kaj la komuna aŭtuna staĝo en Rastatt. Edmond Ludwig dankis al la grupo de Nancio pro la agrabla kaj bone organizita staĝo. Ĝis revido okaze de aliaj renkontiĝoj.



BAVELO-seminario 4a - 6a novembro en Rastatt

La tradicia BAVELO-seminario ĉi-jare okazos en Rastatt. La seminaria temo estos publika rilato - ni sukcesis gajni por tio Lu Wunsch-Rolshoven, kiu gvidas la gazetaran fakon ĉe GEA.

Ankaŭ la ekskursiva programo estos riĉa kaj inspira: La urbo-gvidadon akompanas korta damo, kiu konas la sekretojn de siaj majestoj.

Kvankam ni ne loĝos en la kastelo de Rastatt, ni tamen trovis tre komfortan seminariejon: la jam „klasikan" tre komfortan klerigejon St. Bernhard, kie ni jam okazigis plurajn seminariojn.

Pliaj informoj ĉe / aligoj al Inge.Simon@esperanto.de kaj tre baldaŭ ĉe [esperanto-bw.de](http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr) kaj poste ankaŭ ĉe <http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr>



Ĉu la raporto de la antaŭaj paĝoj estas kompleta? Certe ne. Ne ĉiuj partoprenantoj same spertis kaj ĝuis tiun internacian renkontiĝon. Jen iom pli persona raporto pri tiu sama staĝo en Art-sur-Meurthe fare de Ginette Martin.

Kiam Simone Cajelot kaj mi envenis la ferio-centron de Art-sur-Meurthe vendrede, ni havis la agrablan surprizon, ke la vesper-manĝo ne estis komencinta, kvankam ni estis iom malfruaj.

Sed ĝi baldaŭ okazis. Kio pli bona ol komenci esperanto-renkonton per bonega vespermanĝo? Ni eksciis, ke ni estos inter 45 kaj 50 staĝanoj kaj el diversaj landoj: Francio, Germanio, Luksemburgio, Svedio, Nederlando.

Poste ni malkovris la belan verdan parkon kun florantaj arboj kaj bestoj kaj la aliajn konstruaĵojn: nian dormejon domon kaj la spektaklo-domon, kiu rolis por ĉio: prelegoj, spektakloj, kursoj, libro-servo.

La vendreda vespero estis dediĉita al diversaj ludoj sur tablo: skrablo aŭ aliaj ludoj inventitaj de la Nancia klubo. Mi mem post iom da helpo al Kornelja por prepari la infanojn al la dormo, iris okulumi al la ludosalono, sed mi ĉefe volis eksperimenti mian nov-akiritan komputilon kun la projekciilo, celante eventuale montri ret-filmon. Mi sukcesis instali kablojn, bedaŭrinde ne sukcesis kapti la ret-konekton pro hezito kaj timo enpreni viruson, sed tiuj unuaj provoj montriĝis bonaj por uzo sen ret-aliro. Mi provis vidigi kelkajn fotojn el memorbastono al Ursula, por esti certa, ke la projekciilo funkcias, kaj poste mi iris en la liton. Mi antaŭe uzis sukcese la kodon por malfermo de la ĉefa pordo, la plato estas bone lumigata kaj la ciferoj estas grandaj. Tiuj detaloj gravas por mi, ofte stulta kiam mi devas uzi modernajn.

Sabaton frumatene, mi promenis en la parko antaŭ la manten-manĝo kaj fotis bestojn: azenojn, kaprinojn, diversajn korto-birdojn, inter ili belan pavon.

Post la matenmanĝo ni vojaĝis aŭtomobile al la Muzeo de salo en Haraucourt, apud Varangeville. Kvankan mi supozis multon scii pri la salo, mi malkovris, ke grandega maro kovris parton de Eŭropo antaŭ 240 mil jaroj, antaŭ la leviĝo de la Alpoj. Kaj mi ankaŭ eksciis, ke la salo, aŭ elementoj tirataj el la salo, troviĝas en mil objektoj de la ĉiutaga vivo: vitro, plastaĵoj, ledo, tolaĵoj, produktoj por higieno, lavado, beligo de la korpo. Pli simple serĉi, en kiu substanco la salo ne estas.

Post la reveno al la feri-centro kaj la manĝo, okazis la prezentado de novaj libroj fare de Jean-Luc.

Parenteze, li estis bonŝanculo, ĉar la libro-servo troviĝis en la salono, kiu utilas por ĉio, do ni povis aĉeti aŭ foliumi librojn dum ĉiuj liberaj momentoj, antaŭ kaj post la kursoj, kaj antaŭ la spektaklo kaj antaŭ la manĝoj.

Sekvis poste la kursoj kaj prelego.

Mi ĉeestis la prelegon de Istvan Ertl, kiu sukcesis interesi nin kaj ne endormigi nin; temis pri literaturo en Esperanto. Kiu povas aserti, ke ĝi



ne ekzistas? Ĝi ĉeestas en poezio, historiaj rakontoj, mok-poemoj, sopiroj al virinoj, humuraĵoj, do tre variaj temoj. Disdono de paperaj eltiraĵoj apogis liajn dirojn, kaj nun, kiu dubis ne plu dubas. . .

La du komencantoj kun Catherine Hel laŭ-rakonte tre ŝatis ŝian kurson, same la parol-kursoj de Edmond Ludwig.

Vespere Nataŝa Bertse kun la filo Erik, kiu tre talente gitar-ludas, donis plaĉan koncerton kun agrablaj kantoj.

Dimanĉe matene kursoj okazis denove kaj aldoniĝis la prelego de Catherine Kremer pri restaĵoj de la unua mond-milito: ostoj, detruoj, sed ankaŭ oficialaj monumentoj omaĝe al soldatoj, kaj ne-oficialaj monumentoj omaĝe al civilaj viktimoj. Dank'al la teknika helpo de Andreo Grossmann, la projekciado de fotoj bone akompanis la prelegon.

Post la lasta komuna tagmanĝo ni povis taksi la tri kune pasigitajn tagojn:

La etoso esti tre bona de la komenco ĝis la fino; ni ĉiam bonege manĝis ĉirkaŭ kvazaŭ rondaj tabloj por 8 personoj kaj en familia etoso. La grandaj pladoj venis meze de la tabloj fare de simpatiaj kelneroj, kaj ofte en ĉiu tablo iu rolis patron aŭ patrinon kaj servis la aliulojn.

La Esperanto-nivelo estis sufiĉe bona por plezuraj babiladoj, kaj krokodilado ne havis lokon, des pli ke relative multe da eksterlandanoj partoprenis.

La infanoj de Kornelja donis junan aspekton al la renkonto (3-jara kaj 10-monata), ili estis agrablaj kaj ridetantaj, tute prave Felix havis tiun nomon, li estas feliĉa bebo.

La malĝoja momento estis tiu de la adiaŭoj sed, feliĉe, planoj por estontaj renkontoj ne mankis.

Ni volonte revenus al tiu agrabla loko. Dankon al Jean-Luc, kiu trovis ĝin kaj al la tuta grupo de Nancio, kiu faris multege por la sukceso de tiu renkonto.

Ginette MARTIN



Vojaĝo al Irano fare de Roberto Kueny Amikeco per Esperanto



Parto de la palaco de Isphahan. Esfahan en la persa. Isfahano en Esperanto.

Mi ĵus revenis, la 16-an de aprilo 2016, de vojaĝo al Irano, kaj deziras al vi raportis pri la restado en tiu lando.

En la lasta bulteno "La Informilo" vi jam povis legi la raporton de nia samideano Yves NICOLAS el la urbo Caen (Normandio), kiu vizitis la landon kun sia filino last-septembre 2015.

Mi ne deziras ripetiti pri aferoj kiujn li bone priskribis.

Cetere nia samideano Bruno HENRY jam vizitis la landon kaj plurfoje oni raportis en la lastaj numeroj de "La Informilo".

Koncerne mian sperton pri vizitado al la lando, mi aldonos jenon:

Jam de dek jaroj mi ekkonis es-



Unu specimeno el la ĉiu-taga pano. Kuirita ĵus antaŭ vendado

perantiston el Irano, kiu nomiĝas Hamid SHAERI, precize dum Universala Kongreso en Rotterdamo en 2005, dum matenmanĝo en la sama hotelo. Iĝis amikeco inter ni.

Li jam vizitis min en 2009 venante al Eŭropo por la UK de Bjalistoko. Li invitis min al sia lando. Decidite: marto

2010; sed fine de oktobro 2009 okazis "ia revolucio" en Teherano. Mia edzino ne ŝatis ke mi iru la landon dum la "eventoj"!

En 2015 Hamid, mia irana amiko, ĉeestis la UK-on de Lille, kaj feris poste en mia hejmo. Reinvitado. Decidite: aprilo 2016, kiam la veter-temperaturo ankoraŭ mildas kaj kiam eblas la gvata-do de mia edzino dum du semajnoj per niaj geinfanoj.

Mi alvenis al Teherano la 2-an de aprilo akceptita de Hamid kaj lia frato Mahdi. (Ili loĝas en Karaj, urbo je 50 km de la ĉefurbo).

La lando estas vasta por viziti la vidindaĵojn! Decidite "ke oni prenu min" por vizito al Isphahano kaj Shiraz post unu tago de vizito al la montaraj inter Teherano kaj la "Kaspia maro".

Isphahano (Esfahan en perslingvo) estas for je 500 km de Teherano kaj Shiraz pliaj 500 km!

Do per privata veturilo, Mahdi kaj Hamid kaptis Roberto-n por rondiro je 2500 km dum unu semajno, kaj tiel mi malkovris la juvelojn Isphahano (Esfahan) kaj Shiraz, iliaj "Bazaroj" (malnovaj je kvin cent jaroj), kaj la detruita Persepolis-urbo.

Survoje ni vizitis ankaŭ la belegan "ruĝan" vilaĝon Abyaneh nestitan inter ruĝaj montoj.

Dum la dua semajno la du fratoj ankoraŭ kaptis min por vizito al aliaj vidindaĵoj! Por mi, nekredbla sperto de la ĉiutaga vivo en Mez-Orienta lando, kiu estas Islama Respubliko de la Revolucio de 1979.

Marde vespere, la 12-an de aprilo, mi ekkonatiĝis kun la Esperanto-grupo en la sidejo de Teherano kaj por mia plej granda plezuro la vic-prezidanto donacis al mi ekzempleron de originalaj poem-verkoj en Es-



Nekutima renkontiĝo!



Mi vizitis Persepolis

Persepolis: "La pordo de la Nacioj".



peranto: "Versoj de Persoj".

Dum tiu vespera renkontiĝo mi malkovris la belan verkaron de Omar Khayyam, kiu tronis sur la bretaro de la sidejo.

Imagu libron de kompilaĵo de tradukoj al 30 lingvoj de la kvar-versoj de Khayyam, inter ili 210 en Esperanto, tradukitaj de Waringhien! Bela verkaro, kiun mi ŝatus akiri des pli, ke la ekzemplero ne plu estas reeldonita de post la Revolucio. . . .

. . . . kiam membro de la grupo trovis vendeblan specimemon ĉe privatulo en la urbo Karaj mem, kie



"Koubideh" signifas "frapita" hakita ŝafaĵo sur stango.
"Kebab" signifas kuir-arto per ligno-karbo.

loĝas Hamid! Akiro de la trezoro (por mi) la venontan tagon. Kia bonŝanco!

Mi aĉetis, kompreneble, ankaŭ la verkojn de du konataj poem-verkistoj: Hafez Shirazi: "Amo, Amanto, Amantino" (tradukita en la francan!!) kaj tiuj kvar-versoj de Omar Khayyam, en kvar lingvoj (nur).

En la familio de Hamid en Karaj mi frandis la tradiciajn kuiradojn preparitajn de la patrino kaj onkino. . . . kun trinkaĵo pli dolĉa!

Mi vere trapasis mirindan agrablan restadon dum du semajnoj ĝis la 16-a de aprilo, ĉar bonŝanco estis, ke la vetero belis kaj ĉefe, ke la homoj estis tre, tre afablaj, unue la parenco de Hamid, de kiu mi estis lulita, sed ankaŭ ĉiuj enloĝantoj de la lando, kiuj ofte volis inviti min al manĝo en sia hejmo! Ne-kredeble! Ĉu ĉar mi estas franco? Aŭ pro mia aspek-

to, kun mia barbo, kvazaŭ mi estus la filo de la "Granda Gvidanto de la Revolucio"?

Pri aliaj nekutimaĵoj? Mirigis min la larĝeco de la aŭtoŝoseoj (trivoĵaj!) sur preskaŭ la distanco al Shiraz tra la dezerto.



Jen la manĝaĵo de la kamion-ŝoforoj, rizo, salato, pano, legomoj. . . . kaj de miaj amikoj.
Poste mi-mem manĝis ĉe tablo!



Ce la eniro de grandaj urboj la ŝoseoj iris kvarvoĵaj, do imagu la ŝtop-trafikon de veturiloj je "ok" vicoj (!), . . . kaj tusado de Roberto pro polucio!

Jen la destino de la hodiaŭaj grandegaj urboj. 20 milionoj da enloĝantoj en Teherano, tiom da veturiloj... (multaj Peugeot kaj Renault, kiel jam skribis Yves NICOLAS).

Mirinda preparado kaj kuirado de la panoj, kvar diversaj manieroj, neimagebla por mi! Jes ja mi spertis multajn nekutimaĵojn estante ĉiam gvidita de privatuloj.

Mi havis la eksterordinaran ŝancon enriri la Grandan Moskeon de Shiraz dum la "Granda Vendreda



Alia speco de pano.
Apud mi: mia amiko Hamid.

Preĝo". Ne forgesebila!

Mi estis impresita pro la "laŭvola" ŝoforado de la Irananoj kaj la "laŭvolaj" hodiaŭaj konstruaĵoj, kvankam la praaj malnovaj domegoj kaj palacoj estas tre bone konservitaj.

Kion diri pri la beleco de la fraŭlinoj kaj virinoj de la lando: bele ŝminkitaj, ruĝaj lipoj, kaj belaj nigre ŝminkitaj okulo-haroj kaj brovoj, kun malhelaj pupiloj sub deviga vualo.

Ĉu ili estas pli belegaj sub la vualo? Tiom kiom la "Virgulino", patrino de Kristo?

Mi kunportis "nur kelkajn" kilogramojn da pistaĉoj (inter la tunoj en la magazenoj) kaj gramoj da safrano, kiu surloke kolorigas la ĉiutagan rizon. Sen aludi

pri la tunoj da miel-dolĉaĵoj!

La Irananoj trinkas ofte teon ĉiam sukeritan, dum la tago. Kia memoraĵo por mi ĉar ofte mi spertis nekutimaĵojn, ne imageblan!

Mi deziras ree danki miajn gastigantojn pro ilia afableco. Mirindan belan vojaĝon mi travivis en Irano dank'al amikeco inter esperantistoj.

Cetere Hamid bone scipovas paroli la francan! Mi devas paroli la anglan kun la fratoj de mia amiko, do pena miksaĵo inter la tri lingvoj, se ne ankoraŭ la germana kun iu amikino, kiu ferias "hejme" sed laboras en Germanio kaj nur parolas la persan, la kurdan kaj la turkan!

Roberto.

En Irano estas uzata la Irana kalendaro. La menciita dato sur tiu tikedo estas laŭ la sinsekvo: jaro, monato, tago.

1395.01.24 kongruas kun gregoria kalendaro: 2016.04.24.

Tiu bileto montras la valoron de 274275 Toman. Sed la **Oficiala** devizo estas en Irano: RIAL.


1 000 000 (unu miliono) da Rial valoras 25 €. Do **kial** Toman?

Estas kutimo en la lando kalkuli en Toman, verŝajne por eviti tro da "milionoj". Unu Toman valoras 10 Rial, do 100 000 Toman valoras 25 eŭrojn, do 274 275 Toman valoras 68 eŭrojn (tiu aĉeto).

Cetere cirkulas en la lando monbiletoj sur kiuj oni povas legi **100**, en grasaj ciferoj, kvankam sur la dorsflanko de la bileto estas notite 1 miliono da Rial.

Do **100 SIGNIFAS(!!!!!!!!!!)** 100 000 Toman, 1 miliono da Rial. Ĉu vi komprenis? Ĉu mi estas sufiĉe klare?

Kia komplikaĵo por la eksterlandanoj!



El Vikipedio


La **Persa** aŭ **Irana kalendaro** estas suna kalendaro sistemo, kies novjaro komenciĝas la 21-an de marto (printempa ekvinokso). En marto de la jaro 2002 en Irano estiĝis la jaro 1381 laŭ persa kalendaro. La kalendaro estis adoptita en 1925.

La **persa kalendaro** havas dek du monatojn, ses kun 31 tagoj kaj ses sekvantaj kun 30 escepte de la lasta kiu havas 29 tagoj krom en superjaroj. La jaro komenciĝas je *Novruz*, kiu koincidas kun la 21-a de marto de la gregoria kalendaro.

La 1-a de januaro 2000 laŭ la gregoria kalendaro estis la 11-a de Dej 1378 laŭ la persa.

La **monatoj** de persa kalendaro estas (inter krampoj - la averaĝa komenco de la monato laŭ gregoria kalendaro):

| | Nomo: | Irane: | Signifo: | Tagoj: | |
|----|-------------------|----------|--------------------------|--------|-------------------------|
| 1 | Farvardin | فروردین | impeta forto | 31 | (la 21-an de marto) |
| 2 | Ordibehešt | اردیبهشت | vero kaj puro | 31 | (la 21-an de aprilo) |
| 3 | Ĥordad | خرداد | bonfarto | 31 | (la 22-an de majo) |
| 4 | Tir | تیر | pluv-angelo | 31 | (la 22-an de junio) |
| 5 | Mordad | مرداد | senmorteco | 31 | (la 23-an de julio) |
| 6 | Ŝahrivar | شهریور | majesto | 31 | (la 23-an de aŭgusto) |
| 7 | Mehr | مهر | suno, amikeco, amo | 30 | (la 23-an de septembro) |
| 8 | Aban | آبان | gardanto de l' akvo | 30 | la 23-an de oktobro) |
| 9 | Azar | آذر | fajro | 30 | (la 22-an de novembro) |
| 10 | Dej | دی | kreanto | 30 | (la 22-an de decembro) |
| 11 | Bahman | بهمن | bonaj pensoj | 30 | (la 21-an de januaro) |
| 12 | Esfand | اسفند | modesto | 29/30 | (la 20-an de februaro) |

| | | |
|---|---|---|
| Espéranto France-Est |  | Orient-Franca Esperanto-Asocio. |
| La Informilo | Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO | Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO |
| Rédaction: Redaktoro: | Edmond Ludwig kaj André Grossmann | S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM |
| Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants: | Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci | un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre |
| Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers. | | |

| Komitato de la Asocio | | Comité de l'Association | |
|---|--|----------------------------------|---|
| Funkcio | Adreso | Telefono | Ret-adreso |
| Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i> | S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR | 03.89.77.52.56 | esperanto.eludwig@orange.fr |
| Sekretario <i>Secrétaire</i> | S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE | 03.89.82.37.62 | kueny.robert@neuf.fr |
| Vic-sekretario <i>Secrétaire adjoint</i> | S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN | 03.29.85.05.09 03.02.13.01.32 | catherine2.kremer@laposte.net |
| Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i> | S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM | 03.89.45.62.89 | andreo.ag16@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com |
| Libroservo <i>Service Librairie</i> | S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE | 03.83.53.57.54 | jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net |
| Aliaj komitatanoj | S-ino Liliane BERSWEILER | 03.83.47.41.36 | liliber54@yahoo.fr |
| Assesseeurs | S-ino Micheline COLNOT | 03.83.27.46.93 | michelinecolnot@orange.fr |
| | S-ro Jacques HERLÉ | 03.87.01.00.39 | jacques.herle@laposte.net |
| | S-ro Jacques PINEDA | 03.89.42.88.54 | pineda.ventron@gmail.com |
| | S-ino Simone KIRY | 03.89.57.68.10 | simone.kiry@gmail.com |
| | S-ino Ginette MARTIN | 03.29.24.68.46 | gimavo@wanadoo.fr |
| | S-ino Madette AST | 03 87 01 32 85 06 70 94 11 84 | madette20@hotmail.fr |
| | S-ino Gisèle BERTAPELLE | 03.83.56.17.37 06.80.68.94.78 | bertapelle.gisele@wanadoo.fr |
| | S-ino Catherine HEL | 03.83.47.63.07 | cathello@laposte.net |

| | | | |
|---|---|------------------------|---|
| Abono al La Informilo → | 16 eŭroj | reta abono: 7,50 eŭroj | ← Abonnement à La Informilo |
| Pagoj per ĉeko je la nomo de → | Esperanto France-Est | | ← <i>Paiement par chèque au nom de</i> |
| Pagoj per ĝiro al jena konto → | CCP 1997 72 W NANCY | | ← <i>Paiement par virement au compte</i> |
| Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al → | S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM | | Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier |

| | | |
|-----------------------------|-------------------------------|---|
| 1. Esperanto TV | 15. Aŭtuna staĝo en Rastatt | <p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p> |
| 2. Staĝo Art sur Meurthe | 16. El la gazetoj | |
| 3. Staĝo Art sur Meurthe | 17. Bavelo-Gresijono | |
| 4. Staĝo Art sur Meurthe | 18. Padoj al longa vivo | |
| 5. Vojaĝo al irano Roberto | 19. Padoj al longa vivo | |
| 6. Vojaĝo al irano Roberto | 20. Staĝo en Metabief | |
| 7. Vojaĝo al irano Roberto | 21. Staĝo en Metabief | |
| 8. Komitatanoj kaj Menuo | 22. Libro "Momo la histriko" | |
| 9. Angulo de la prezidanto | 23. Jubileoj | |
| 10. Libroj Tiŝlar | 24. Jubileoj | |
| 11. Libroj "Carlo" kaj TAKE | 25. Jubileoj | |
| 12. Libroj | 26. IFEF-kongreso en Bulgario | |
| 13. Humuraĵoj- enigmoj | 27. IFEF-kongreso en Bulgario | |
| 14. Aŭtuna staĝo en Rastatt | 28. Kongreso en Marseille | |

Karaj gesamideanoj,



Jam alvenis la somero kaj denove vekigās la emo partopreni plej diversajn aranĝojn tra Esperantio. Certe vi ĝuos la kunestadon kaj babiladon kun de longe konataj aŭ novkonataj samideanoj, vi ĝuos prelegojn kaj spektaklojn kaj malkovros novajn pejzaĝojn kaj kutimojn. Ĝuu plene!

Tamen: iom memoru pri la redaktoro de LA INFORMILO, kiu ege ĝojos, kiam li ricevos post via reveno viajn kontribuojn, kiuj spegulos la praktikadon de nia kara lingvo.

Agrablan vojaĝon kaj esperantumadon!

Edmond LUDWIG

Ĉu ĉi-suba memoraĵo de la infanaĝa estonta Nobel-premiita verkisto ELIAS CANETTI ne plej efike ilustras la neceson eviti militojn por la solvado de konfliktoj?

Frateco

Eltiraĵo el *Die gerettete Zunge* (1977) de ELIAS CANETTI (1905-1994)

La sceno disvolviĝas en Zurigo fine de la Unua Mondmilito. La aŭtoro promenas en la urbo kun sia patrino.

Tiam venis renkonte al ni grupo da francaj oficiroj, en siaj okulfrapaj uniformoj. Luj inter ili marŝis kun malfacilaĵo, la aliaj sin adaptis al ilia irmaniero. Ni restis senmovaj, por ke ili malrapide povu paŝi preter ni. "Jen grave vunditoj, diris mia patrino," ili restadas en Svisio por resaniĝi. Oni interŝanĝos ilin kontraŭ germanoj."

Kaj jam alvenis de la alia flanko grupo da germanoj, ankaŭ inter ili kelkaj kun lambastonoj, kaj la aliaj malrapide pro tiuj ĉi. Mi ankoraŭ memoras, kiel timego min paralizis. Kio okazos nun, ĉu ili sin ĵetos unuj kontraŭ la aliaj? Ni estis konsternitaj, ni ne flankenpaŝis ĝustatempe, kaj subite ni retroviĝis meze de ili, kaptitaj inter ambaŭ grupoj, kiuj deziris pretermarŝi. Tio okazis sub la arkadoj, restis ja sufiĉe da loko, sed dum ili kruciĝis, ni vidis iliajn vizaĝojn de plej proksime, neniuj estis deformita pro malamo aŭ kolero, kiel mi tion atendis. Ili rigardis unu al la alia, trankvile kaj afable, kvazaŭ tio estus banalaĵo. Luj soldatsalutis. Ili marŝis multe pli malrapide ol aliaj homoj, kaj la tempo dum ili preterpasis, ŝajnis al mi eterneco.

Unu inter la francoj rigardis returne, levis sian lambastonon ĉielen, iom ĝin svingis kaj alkriis la jam preterpasintajn germanojn per iu: "Salut!" Germano, kiu tion aŭdis, lin imitis, ankaŭ li havis lambastonon, kiun li svingis, kaj li reciprokis la saluton franclingve: "Salut!"

Kiam oni aŭdas tion, oni povus pensi, ke la lambastonoj estis svingitaj minace, sed tio nenielis, tiamaniere ili montris al si reciproke, antaŭ la adiaŭo, kio komuna al ĉiuj postrestis: la lambastonoj.

El la germana tradukis E.L.

Sekve de la vodoĉno por Briteliro, la francoj nun levas la demandon pri la ebleco, ke la angla ne plu estu oficiala lingvo de EU ... **tio estas logika !**

Teorie ĉiuj oficialaj lingvoj de la membro-ŝtatoj estas egalaj, sed iuj estas pli egalaj ol aliaj ... **temas pri speco de kultur-lingva rasismo.**

Kion opinias pri tio niaj eŭro-parlamentanoj?

Atentu: Pro teknikaj (aŭ komercaj) kialoj **SFR** ne plu proponas akcepti retejojn.

Nia retejo: **<http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr>**

baldaŭ ne plu funkcios. Ĝi estas translokigita al nova retejo:

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Blanko sur nigro Rubén González Gallego (Mondial)

La finna ĵurnalisto Kalle Kniivilä nun konatas en nia movado pro lia kono de Rusio. Tion li jam brile demonstris tra siaj libroj *Krimeo estas nia* kaj *Homoj de Putin*, kiuj jam furoris en Esperantujo.

Ĉifoje li meritas laŭdojn pro lia traduko el la rusa al Esperanto de la majstroverko de Rubén Gallego *Blanko sur nigro*.

Por ĉi membiografia romano Rubén Gallego ricevis la rusan Booker-premion. En ĝi li priskribas sian vivon kiel handikapito en soveta interneto, ĉar li estis grave handikapita infano, sidanta en rulseĝo kaj kapabla movi nur kelkajn fingrojn.

Sed ne “strikis” lia cerbo. Li – kiel multaj samsortanoj liaj – uzis sian brilan inteligenton por travivi iel decete sian restadon en diversaj internejoj, en kiuj oni ja lin nutris kaj edukis, sed en kiuj la vivo estis lukto kun kaj kontraŭ siaj kunsuferantoj, siaj edukistoj kaj la prizorgantaj blukitelaj “onjoj”.

Lia avo, iama estro de la hispana komunista partio, kiu rifuĝis en Sovetio, rakontis al la patrino, ke Rubén mortis post la naskiĝo!!!

Kredu min: oni voras la libron tuj post la eklego!

Cetere: post edziĝo, patriĝo kaj studo de anglistiko, juro kaj komputiko, Rubén Gallego ekloĝis en Usono. Li verkis antaŭparolon por la traduko, ĝojante ke ĝi aperas en la lingvo de la espero. E.L.

Du elstaraj libroj de Zlatko Tišljar

Ekde mia translokiĝo al Slovenio oni ofte min demandas, kial mi ne fariĝas sloveno, en Kroatio oni demandas min, kial mi defendas slovenojn, mi ja estas kroato... Ambaŭ postulas, ke mi decidu, ĉu mi estas unu aŭ alia. Nur esperantistoj neniam postulis de mi ŝanĝi mian nacian apartenon. Kontraŭe, ili eĉ tre interesiĝis pri ĝi.

Zlatko Tišljar

La supra citaĵo kvazaŭ resumas la filozofion de du elstaraj libroj de Zlatko Tišljar, eminenta promocianto de Eŭropo kaj de Esperanto en Eŭropo. Hazarde mi trovis reklamilon pri eseo, kiu tuj kaptis mian atenton. Tion sukcesis la ŝoka titolo: *Eŭropo, vi baldaŭ mortos**. Post mendo mi ege miris, ĉar ĝi aperis jam en 2005 kaj mi, kiel avida traserĉanto de novaj aperigoj, ĝin neniam rimarkis. Mi konfesu, ke tiuepoke la ideo de disfalo de Eŭropo ankoraŭ ne tiom akre esprimiĝis en la amaskomunikiloj. Post tralego mi ne iĝis pli optimisma koncerne la pluvivon de Eŭropa Unio, sed la aŭtoro sukcesis min persvadi, ke Esperanto „estintus“ – ĉu eble pli optimisme – „estus“ grava ilo por demokrata federacia Eŭropo. Necesus eĉ diri: eble la plej grava ilo. Ne malkredu!!! Legu la eseon!

Kroata samideanino atentigis min pri ĵus aperinta plia verko de Pajo (Zlatko Tišljar) : *NEKUTIME PRI MULTIO Eseoj kaj artikoloj***. Ĝi konsistas en 78 artikoloj pri la temoj BIOGRAFIOJ - ESPERANTAĴOJ – FILOZOFIO/ETIKO – LINGVISTIKO – PEDAGOGIO – POLITIKO – RECENZOJ. Enestas eĉ du personaj poemoj. Tio signifas, ke la leganto povas adapti la legadon al la disponebla tempo kaj al siaj laŭtemaj preferoj.


Sciante ke Zlatko Tišljar naskiĝis en la jaro 1945 en Zagrebo (Kroatio), ke li studis en la filozofia fakultato pri la germana lingvo kaj soci-humanisma informatiko, ke li estris la esperantistan entreprenon IKS (Internacia Kultura Servo) en Zagrebo, ke li tie organizis la Pupteatran Internacian Festivalon (PIF), ke li estis la motoro de la Zagreba Metodo adaptita al pli ol 30 lingvoj, ke li magistriĝis en 1995 pri kibernetiko ĉe la Internacia Akademio de Sciencoj San Marino, ke li estis membro de la Verda Partio de Slovenio kaj pinta aktivulo en EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), vi certe komprenos, ke ĉi artikolaro estas ia vivmonumento de erudicia samideano, ĝisosta esperantisto, kies esperantisteco tutnature integriĝas en sian ĉirkaŭaĵon, kiun li analizas plej akraŭde kaj racie. Ni nur esperu, ke ĉi libro ne restos lia lasta! Ja multegon ni povas lerni dank'al li! Krome: admirindas la laboro de liaj skipoj.

Edmond LUDWIG

* *Eŭropo, vi baldaŭ mortos* Copyright 2005 Zlatko Tišljar 63 paĝoj

***NEKUTIME PRI MULTIO Eseoj kaj artikoloj* Zlatko Tišljar – Pajo

Zagreb 2015 231 p. Eldonejo IZVORI



Jen kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi, en malfacila periodo, kiam en Eŭropo furiozis la dua mondmilito.

Lia patro Arturo, itala esperantisto, kaj Vera, latva esperantistino, ja konatiĝis koresponde pere de Esperanto kaj geedziĝis en Italio, sed la Dua Mondmilito ilin disigis kaj ilia bebo Carlo iĝis Kārlis en Latvio, dum la patro estis malliberulo en nazia lagero. Nur plurajn jarojn post la milito Kārlis iĝis denove Carlo en Italio. Sekvis plenkreskula vivo en Germanio kaj Svislando.

La edzino de Carlo, Anne-Lise Nicolodi-Nielsen, danino kaj esperantistino, iniciatis la eldonadon de tiu libro en la germana kaj dana lingvoj.

Tiam Edmond Ludwig leginte la libron tuj ekhavis la emon ĝin traduki al Esperanto.

Tial ni nun povas proponi al vi la Esperanto-version de tiu libro eldonita de la asocio Esperanto-France-Est.

92-paĝa libro je 11 €
 Afranko por Francio 2,80 €
 al Eŭropo 1 €



Ambaŭ libroj estas mendeblaj ĉe nia kasisto:

André Grossmann,
 5, rue des Pyrénées
 68390 BALDERSHEIM

Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY



KONSTRUADO kajero de TAKE 2016



Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
 Wintzenheim Francio

KONSTRUADO-kajero estas la nova eldonaĵo de TAKE kaj anstataŭas la antaŭan broŝuron JARKOLEKTO de TAKE.

Ĝin redaktis Pierre Grollemund el Francio kun la helpo de kelkaj aŭtoroj.

Ĉi-sube troviĝas la enhavo de tiu unua KONSTRUADO-kajero. Kvankam la artikoloj iel rilatas al konstruado, ili ne celas fakulojn. Ĝin ricevis ĉiuj membroj de TAKE. Ĝi estas ankaŭ aparte akirebla por 8 eŭroj (sendkostoj inkluzivitaj).

| N ^o | Titolo | Aŭtoro | Paĝoj |
|----------------|---|-------------------|-------|
| 1 | Ili konstruis piramidojn! Kiel ili faris? | André Cherpillod | 5 |
| 2 | Ĉu iam mankos plaĝoj? | Pierre Grollemund | 14 |
| 3 | La ĉefa stacidomo de Zagreb | Zlatko Hinšt | 20 |
| 4 | Zaha Hadid arkitektino | Walter Klag | 31 |
| 5 | Zaha Hadid en Vieno | Kris Kezer | 34 |
| 6 | Arkitekturo de komenco ĝis fino | Claude Bensimon | 36 |
| 7 | Pri la partoprena arkitektura programado | Claude Bensimon | 40 |
| 8 | Korodo sur mar-betono | Eva Kiry | 45 |
| 9 | Terminologio: Ĉu necesa laboro? | Pierre Grollemund | 52 |
| 10 | Pliaj konsideroj pri terminologio | Pierre Grollemund | 64 |
| 11 | Kiam falis la turoj de Nov-Jorko | Usona kolektivo | 68 |
| 12 | Alvoko al la legantoj | Pierre Grollemund | 72 |

IDOJ DE LA IMPERIO *La rusoj en Baltio* Kalle Kniivilä Eldonejo Mondial

Post *Homoj de Putin* kaj *Krimeo estas nia*, la profesia finna ĵurnalisto Kalle Kniivilä, loĝanta nun en Svedio, verkis novan intereseĝan libron pri la ruslingva loĝantaro en Baltio vojaĝinte tra Estonio, Latvio kaj Litovio.

Dank' al la konversacioj kun la ruslingvaj loĝantoj li portretas ilian sintenon rilate ilian baltan loĝlandon kaj rilate Rusion 25 jarojn post la disfalo de Sovetunio. Dank'al multaj konversacioj la leganto konstatas, ke malsamas la opinioj laŭ la aĝo, laŭ la deveno en la iama vastega Sovetunio, laŭ la klereco, ktp. Ankaŭ la civitanaj rajtoj de la ruslingva loĝantaro malsamas laŭ la nun sendependaj landoj.

Ĉi kleriga verko de profesia enketisto reganta la rusan lingvon kontribuas al pli fajna analizo de problemoj, kiuj – en la gazetaro de la „grandaj“ landoj - tro ofte aperas laŭ skemo nigra-blanka.

E.L.

El la libro "Kvodlibeto", de Julia SIGMOND kaj Sen RODIN

Sept graines de citron (texte de Julia SIGMOND, qui a paru dans *Monato* en 2007).

Huit personnes travaillaient au bureau. Sept femmes et un homme, le chef.

Les femmes travaillaient en paix. Seul le chef était querelleur. Les femmes ne l'aimaient pas. Son vocabulaire était affreux, il jurait constamment. En outre il fumait. Les femmes ne fumaient pas, mais elles n'arrêtaient pas de suffoquer. Tous les jours elles se querellaient avec lui pour qu'il fume à l'extérieur et pas au bureau. Mais en vain.

Maria était la plus à plaindre, car elle avait un mari semblable. Celui-ci avait un comportement abominable. Souvent elle arrivait au bureau le matin en pleurant, et seules nos paroles de consolation l'aidaient à travailler quand même et ne pas rester à pleurer.

Gisèle était toujours souriante, c'était une épouse heureuse. Elle ne comprenait pas et ne pouvait pas croire que tous les hommes n'étaient pas d'aussi bons maris que le sien.

Il y avait deux collègues du nom de Madeleine. La plus âgée était très maigre, silencieuse; elle travaillait assidûment, mais ne faisait pas attention aux problèmes des autres. La plus jeune était une fiancée heureuse; elle écoutait, un peu naïvement, les conversations de ses collègues.

Catherine était très pauvre, mais fière. Elle ne voulait pas accepter l'aide des autres. Pour elle, c'était de l'aumône si quelqu'un lui donnait une pomme ou quelque nourriture. Quelquefois, elle souffrait de la faim sans rien dire.

Elizabeth avait un grand fils, dont elle avait accouché quand elle était fille. Après son mariage, elle avait mis au monde un deuxième fils, mais son mari ne voulait pas accepter le premier enfant, alors Elizabeth devait aider son fils aîné en secret.

Ensuite j'ai fait mon apparition. J'étais la plus jeune. Les femmes étaient très amicales, pacifiques; c'est pourquoi je me suis rapidement habituée à elles et au

travail.

Mais je ne pouvais absolument pas accepter le comportement du chef. Alors, je lui ai demandé de ne pas fumer, parce que nous ne pouvions pas supporter la fumée. Je ne me suis pas disputée avec lui; toujours très gentiment, je lui ai demandé cette faveur avec une voix douce. C'est ainsi que j'ai réussi à ce qu'il ne fume presque plus au bureau.

Ensuite j'ai commencé la bataille contre son abominable façon de parler. J'ai réussi avec bien du mal. Parfois je lui demandais: si sa mère était ici, est-ce qu'il parlerait aussi mal? Il s'est offusqué que j'avais eu l'audace de mentionner sa mère, mais cependant il utilisait moins souvent des mots grossiers. En fait, j'avais réussi à l'apprivoiser.

Le 19 novembre, nous avons fêté la sainte Elizabeth. Elle avait apporté des pâtisseries, et même le chef a participé à notre petite fête pendant la pause d'une demi-heure. Nous avons offert à Elizabeth des fleurs, un livre et, parmi nos cadeaux, il y avait aussi un très gros citron. Nous avons fabriqué du jus de citron, car il était interdit de boire des boissons alcoolisées au bureau.

Le citron contenait sept graines. Tout juste sept, comme le nombre de femmes qui travaillaient ensemble dans la même pièce.

- Semons-les, ai-je proposé.

Nous avons cherché sept pots de fleurs et les avons remplis de bonne terre, ensuite nous avons semé les graines de citron. Nous avons écrit le nom de sa propriétaire sur chaque pot. Nous les avons arrosés régulièrement, jusqu'à ce qu'apparaissent les petites pousses vertes.

Et les plantes ont commencé à grandir. . .

traduit de l'espéranto par Catherine Roux-Harelle avec l'aide de Ginette MARTIN

Humuraĵoj

Virino en apoteko:

- Ĉu vi havas salicil-acetatan acidon?
- Jes, sed kial vi ne diras simple "aspirinon"?
- Jes ja, mi ne scias kial, sed mi ĉiam forgesas la nomon!

Iu direktoro deziras dungi kunlaboranton por kalkulado.

Li venigas kandidatojn por testi ilin. Venas la unua:

- Sinjoro, ĉu vi kapablas kalkuli?
- Jes, mi estas eks-tenisisto. Mi scias kalkuli: 15-0, 15-30, 30-0.
- Ne, vi ne taŭgas. Sekva kandidato, eniru!
- Sinjoro, ĉu vi kapablas kalkuli?
- Jes, mi estas eks-militisto, mi scipovas kalkuli: unu-du unu-du unu-du. . .
- Ne, ne, tio ne taŭgas. Sekva kandidato, eniru!
- Sinjoro, ĉu vi kapablas kalkuli?
- Jes, mi estas eks-ŝtato-ficisto kaj mi kapablas kalkuli: unu-du-tri-kvar-kvin-ses-sep-ok-naŭ-dek. . .
- Perfekte, vi estas la taŭga homo por mi. Kaj post dek?
- Facile: fanto, damo, reĝo!

En malgranda urbo de komunista lando, oni diskutas

Matematikaj enigmoj

- Iu fiŝisto kaptis fiŝon, pro tio li ege feliĉis. Demandite kiom da kilogramoj pesas la fiŝo, li respondis: "La vosto pesas 1 kilogramon, la kapo pesas tiom kiom la vosto mem plus la duono de la korpo; la korpo pesas tiom kom la kapo kaj la vosto kune. Diru al mi kiom da kilogramoj pesas la fiŝo?"
- La avo estas 56 jara kaj la nepo 14 jara. Kiam la avo havos la duoblan aĝon de la filo?
- La sumo de la aĝoj de la patro kaj de la filo estas nun 74 jaroj. Antaŭ kvin jaroj la patro estis trioble pli aĝa ol sia filo. Kiom jara estas ambaŭ hodiaŭ?

• La difektita murhorloĝo

Estis difektita la murhorloĝo de iu persono. Li avertis la ripariston. Ĉi tiu sendis sian helpanton ĉar mem estis tro okupita. La helpanto riparigis la montrilojn kaj muntis ilin denove. Poste li streĉis la horloĝ-risorton kaj akordigis la horon al la sia propra horloĝo. Tiumomente la horo notis ĝuste 6a00. La grandan montrilon li fiksas al 12, dum la malgrandan al 6. Poste li revenis al la laborejo.

Ne malfruis kiam la kliento denove telefonis. Li plendis, ke la horloĝo ankoraŭ ne bone funkciis. La helpanto reiris al li.

Mirigite, la horloĝo ankaŭ tiumomente notis ĝuste 8a10, tiom, kiom la horloĝo de la

ĉiun merkredon pri fundamentaj problemoj de la mondo, ankaŭ pri la lokaj problemoj. Ĉe la fino, la kamarado prezidento demandas:

- Kamaradoj, ĉu vi havas demandojn?

Unu mano leviĝas.

- Mi aŭskultas vin, kamarado Popov, diras la prezidento.

- Kamarado prezidento, mi havas du demandojn:

Kial la aŭtomobiloj estas tiom kostaj?

kaj kial oni ne plu trovas buteron en magazenoj?

- Kamarado Popov, viaj demandoj estas fundamentaj. La komitato pripensas, kaj venontan semajnon, vi havos la respondon.

Unu semajnon poste, denove oni diskutas pri fundamentaj problemoj kaj ĉe la fino de la renkonto:

- Kamaradoj, ĉu vi havas demandojn?

Unu mano leviĝas.

- Mi aŭskultas vin, kamarado Souskov, diras la prezidento.

- Kamarado prezidento, mi havas tri demandojn:

1. Kial la aŭtomobiloj estas tiom kostaj?

2. Kial oni ne plu trovas buteron en magazenoj?

3. kaj kie estas nun la kamarado Popov?

Dentisto provas eltiri denton de homo:

- Ne krii tiom forte, mi eĉ ankoraŭ ne tuŝis vian denton!

- Ne, sed vi marŝas sur mian piedon!

helpanto. Ĉi lasta revenis denove al sia laborejo. Morgaŭan matenon, oni aŭdis ree la telefonon, tra kiu la kliento plendis ke lia murhorloĝo ankoraŭ ne bone funkciis. La helpanto vizitis lin denove, sed ankaŭ tiumomente la murhorloĝo notis tiom, kiom lia brak-horloĝo, nome 7a05... La helpanto volis reiri sed la kliento haltigis lin. Restinte kelkajn pliajn minutojn tie, la helpanto finfine komprenis kie estis la eraro. Ĉu ankaŭ vi, kara leganto, ekkomprenis tion?



• La poŝoj

Se el la dekstra poŝo mi enmentas en la maldekstran tiom da mono kiom havas aktuale la maldekstra, tiam ĉe la dekstra poŝo restos kiel ajn 30 eŭroj pli ol ĉe la maldekstra. Kiom da eŭroj havis dekomence ĉiu poŝo?

• La kinejo

En iu kinejo la nombro de la vicoj kaj de la seĝoj en ĉiu vico samas. Oni aldonis 5 vicojn kaj malpliigis la nombron de la seĝoj en ĉiu vico tiamaniere ke la ĝenerala nombro de la seĝoj restis la sama. Kiom da seĝoj estas en la kinejo?



kaj BAVELO
Invitas al

80a regiona staĝo kaj 38-a BAVELO-Seminario 4a - 6a Novembro 2016 en Rastatt



Martin
Ptasinski



Lu
Wunsch



La kastelo de la ĝardeno flanko

Dum la seminario ni loĝos refoje en Bildungshaus St. Bernhard, komforta seminariejo apud la centro de la urbo. Rastatt estas malgranda urbo, tamen plenplena de Eŭropa historio: 1714 en la freŝkonstruita kastelo okazis la intertraktado kaj la sigelado de la *Paco de Rastatt*, per kiu estis finita la *Milito pro la hispana sukcedo* – fora konsekvenco de tio estas interalie la plifortiĝo de la angla lingvo. Unu parto de la bukeda kurso estas dediĉita al ĉi tiu epoko tre interesa, tre influa ĝis hodiaŭ, sed tamen preskaŭ forgesita.



Kiel kutime ni proponas kursojn por komencantoj, progresantoj (Martin Ptasinski, maldekstre), ekparolantoj kaj bukedan kurson. Nova propono estas la ebleco plispertiĝi pri instruado per observado de sperta instruisto en la kurso de la progresantoj. En la bukeda kurso ĉi foje estos interalie parto pri publika agado kun Lu Wunsch-Rolshoven (dekstre) kaj Bruno Flochon, alia pri la historio de Rastatt kaj Eŭropo, nome pri la *Milito de hispana sukcedo* kaj ĝiaj konsekvencoj ĝis hodiaŭ (Ramon Perera kaj Alois Eder), pri novaĵoj el la libroservo (Jean-Luc Thibias).

La kursoj kaj la instruistoj
komencantoj - Rotraud Wetzell
progresantoj - Martin Ptasinski
instruobservado - (observi la instruiston de la progresantoj)

paroliga – Edmilson Lima Serejo
bukeda – Lu Wunsch-Rolshoven kaj Bruno Flochon, Ramon Perera kaj Alois Eder, Jean-Luc Thibias, Bernhard Eichkorn

Programo

vendredo, 4 novembro

14:30 - 17:00 eventuale ekskurso por frualvenintoj
17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj
18:00 - 19:00 bonvenigo kaj vespermanĝo
19:00 - 20:00 enkonduko
ekde 20:15 vespera programo (konatiĝo, ludo)
poste knajpo

sabato, 5 novembro

07:30 - 08:30 matenmanĝo
09:00 - 11:45 kursoj
12:00 - 13:00 tagmanĝo
14:00 - 17:00 ekskurso (Riedmuseum – muzeo pri la regiona vivo)
17:00 - 18:00 la libroservo prezentas
18:00 - 19:00 vespermanĝo
danckurso kun Jochen
poste knajpo

dimanĉo, 6 novembro

07:30 - 08:30 matenmanĝo
08:30 - 09:00 redono de ĉambroj
09:30 - 11:45 kursoj aŭ ekskurso
12:00 - 13:30 resumo, tagmanĝo, adiaŭo
poste ebleco partopreni specialan gvidadon tra la ekspozicio „Rompiĝemaj valoraĵoj“ en kastelo Favorite (entute 12 €)



Alveturo: < <http://www.st-bernhard-rastatt.de/anfahrt/> germanlingve >

per publikaj transportiloj

Rastatt estas trajnstacio de la vojo Karlsruhe – Baden-Baden – Basel. La seminarejo estas atingebla de la stacio Rastatt per taksio, buso, piedoj (1,1 km).

Piede sur Bahnhofstraße direkte al „Stadtmitte“ ĝis trafikluma vojkruciĝo turnu dekstren kaj sekvu la sildojn „Krankenhaus“, post 900 m dekstre estas Bildungshaus St. Bernhard.

Buso 231 direkte al Wintersdorf ĝis haltejo „Am Hasenwäldchen“. Sekvu la veturatan direkton sur "Zaystraße", post 50 m maldekstre estas Bildungshaus St. Bernhard.

per aŭto

Rastatt aŭte atingeblas per ekspresvojo A5 (Karlsruhe-Basel). Venante sur A5 prenu elveturejon **Rastatt Süd**, daŭrigu direkte al Rastatt sur B3. Sekvu la straton dum preskaŭ 5 km, post maldekstra Mercedes-Benz-Kundencenter turnu dekstren je la sekva trafikluma vojkruciĝo. Post 800 m situas Bildungshaus St. Bernhard maldekstre. Aŭtolasejoj estas en korto.

Bildungshaus St. Bernhard

An der Ludwigsfeste 50
76437 Rastatt
Tel: 07222 104 660
Fax: 07222 104 6610

Koordinatoj:

latitudo: N 48°51'45.6"
longitudo: E 8°12'11.8"

Kotizo: 30 €. Aparta oferto por junuloj ĝis 27: 60 € por ĉio (kotizo, tranoktadoj, manĝoj)
La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago al unu el niaj kontoj.

Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Rastatt

| S-ro S-ino | Familia nomo | Persona nomo | naskiĝjaro |
|---------------|--------------|--------------|------------|
| 1 | | | |
| 2 | | | |

Adreso:

Telefono:

Ret-adreso:

Pagenda: kotizo+tranoktadoj+manĝoj.....+.....+.....=.....

Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est

| Tranoktado (kun matenmanĝo): | vendrede/ sabte | sabate/ dimanĉer | 1 nokto | 2 noktoj |
|------------------------------|--------------------|---------------------|---------|----------|
| 1-lita ĉambro kun duŝo | | | 75 € | 110 € |
| 2-lita ĉambro kun duŝo | | | 55 € | 80 € |
| 2-lita ĉambro sen duŝo | | | 40 € | 60 € |
| 4-lita ĉambro sen duŝo | | | 35 € | 50 € |

| Nombro da manĝoj | vendrede | sabate | dimanĉe |
|-------------------------|----------|--------|---------|
| matenmanĝo sen tranokto | 10 € | | |
| tagmanĝo | 15 € | | |
| vespermanĝo | 11 € | | |
| Mi ŝatas manĝi | vegetare | vegane | |

Mi havas alergion kontraŭ

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas.

Pagebla per ĝiro al CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM ret-adreso:andreo.ag16@free.fr

Aliĝilon bonvolu sendi al: prefere per ret-mesaĝo al inge.simon@esperanto.de aŭ poŝte al S-ino Inge SIMON, Brünner Str. 20 DE-73431AALEN Tel. 00.49-7361/ 360 615,

- Mi partoprenas kurson
- komencantoj
 - progresantoj
 - paroliga
 - bukeda
 - instru-observado



■ Gisèle Bertapelle et Liliane Bersweiler : « L'espéranto c'est facile ! ».

Association

Vandœuvre : l'espéranto, un pont entre les cultures

À Si T Cirque, un stand interpelle ceux qui s'y arrêtent. Gisèle Bertapelle et Liliane Bersweiler présentent l'espéranto. « C'est facile » affirment-elles de concert. Et de faire partager leur passion : « Une langue internationale, parlée dans 120 pays à travers le monde, qui nécessite un court apprentissage. Elle est économique, efficace et équitable au problème de communication entre personnes de langues différentes. L'espéranto est un pont entre les cultures, et ne vise pas à remplacer les langues nationales et régionales. Des racines lexicales et des terminaisons simples, se combinent pour former un vocabulaire riche et

précis que l'on peut apprendre à tout âge ».

Elles échangent entre elles, les spectateurs ressentent de l'étonnement, ils saisissent un mot, puis un autre. L'espéranto est composé de racines latines, auxquelles se combinent des terminaisons, toujours les mêmes, qui indiquent la nature, le genre. Un stage régional, organisé par l'association espéranto-Nancy-54, se déroulera au CLAM à Art-sur-Meurthe, dans le cadre verdoyant vous pourrez apprendre l'espéranto, vous perfectionner, bavarder ou simplement écouter.

Les 23 et 24 avril.
Renseignements au
06.76.54.77.78

El la gazetaro pri Esperanto kaj en Esperanto

Migradi en Alzaco

En Alzaco de la 17a ĝis la 22a de aprilo grupo da esperantistoj el Germanio, Francio, Usono kaj Svislando partoprenis la 3an Printempan Migradon. Dum ĉi tiuj tagoj ni profitis la pejzaĝan diversecon inter vinplantejoj, arbaroj, montaro kaj riveroj. La migrado permesis la malkovron de pluraj vidindaĵoj ĉirkaŭ Colmar, interalie, de la mezepokaj kasteloj kaj urbocentroj, de lagoj nigra, blanka kaj de la trutoj.

La plej ŝatataj de la partoprenintoj estis la promenado per boateto de la historia kvartalo "petite Venise" en Colmar kaj la vingustumado. Ĉi-jare la vetero krom la unuan tagon estis sama kiel la etoso de la aranĝo! La 4a migrado okazos en aprilo 2017 verŝajne en la sama regiono.

Olivier Buisson

11

VIE ASSOCIATIVE

Escapade espérantiste à Outines

C'est par une journée printanière que des membres d'Espéranto 10 se sont rendus récemment à Outines, dans la Marne, près de Chavanges, à l'invitation de Maryvonne Rincet, représentante de l'association Les Amis de la nature qui compte quelques fervents espérantistes.

Ce petit groupe de Châlonnais avait souhaité organiser un week-end de rencontre pour connaître et rassembler des espérantistes des régions et départements voisins. Projet réussi car une douzaine de personnes venues de région parisienne, de Reims, d'Alsace, de Dijon, de Joinville, de Troyes... ont répondu à l'appel.

C'est dans un cadre délicieusement champêtre que s'est déroulé ce week-end, dans ce petit village de la Marne qui s'enorgueillit de l'une des plus belles et plus vastes



Les visiteurs venaient de tout le Grand-Est, mais aussi de région parisienne.

églises à pans de bois de la région, à quelques kilomètres du lac du Der.

Le groupe a également pu assister à un petit spectacle en espéranto. Le programme a aussi été consacré à la visite d'églises typiques de

cette région de la Champagne humide.

Partage d'expériences, de pratiques, de projets ont abouti à l'idée de poursuivre ce type de rencontres lors d'invitations mu-

tuelles. Ainsi a germé le projet d'associer le groupe présent à Outines à la célébration à Troyes du « Zamenhofa Tago », en décembre 2016, qui fera suite à un congrès en Moselle, à la fin avril.

BAVELO kaj alzacaj Esperanto-amikoj invitas al taga ekskurso al Iffezheim

Ni renkontiĝos je Sabato, 24-a de Septembro 2016

Ĉi-foje ni ne planas kutiman migradon, sed viziton de vidindaĵo. Ĉi tiu renkontiĝo reprenas la temo-fadenon de la pasintaj migradoj, ni okupiĝos pri akvo kaj energio. Unu el la plej grandaj fluakvo-centralo de Eŭropo estos nia celo, la rejn-centralo Iffezheim, komuna francgermana energiprojekto de la firmaoj En BW kaj EDF.

Pro tio atentu la sekurec-indikojn.

Post la vizito ni eniros gastejon kaj promenos en la proksima cirkaŭaĵo. Organizanto: Engelbert Sester

Programo

10:00 h Kunveno antaŭ EnBW Infocenter Iffezheim

10:30 – 13:30 h Vizito de la Rejncentralo Iffezheim

14:00 h manĝopaŭzo en la gastejo Rheinstüble (07229/1777)

15:30 h Promeno apud la centralo aŭ veturado al la pramo Plittersdorf

Vesperon eble denova gastejvizito.

Adreso

EnBW Energie Baden-Württemberg AG
An der Staustufe 27
76473 Iffezheim



SOMERAS

la Esperanto-studad-semajno

5 Esperanto-kursoj kaj interesaj aktivaĵoj

de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2016
opcie : Tuttaga ekskurso, la 14-an de

aŭgusto 2016

Bonvenon!

**Esperanto-Kulturdomo
Kastelo Gresillon**

6a Festa Semajno por infanoj, junuloj, familioj, geavoj
de la 21-a ĝis la 28-a de aŭgusto 2016
Ludoj, banado, manlaboroj, sporto, muziko kaj E-kursoj

FR-49150 BAUGÉ-EN-ANJOU
kastelo@gresillon.org
<http://gresillon.org/s4>

KIAM, KIE, KIO OKAZAS? - INTERNACIA KALENDARO

pri Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, festivaloj!

La "Internacia Kalendaro" listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn.

- **Vojaĝu** al Esperanta renkontiĝo! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon, kun datoj, nomoj, mallonga priskribo, reteja adreso, ktp!
- **Se mankas iu aranĝo**, anoncu kaj registru ĝin senpage!
- **Diskonigu, reklamu** la Kalendaron al viaj Esperantistaj amikoj

La Internacian Kalendaron funkciigas teamo de la Esperanto-Centro "Eventoj" en Budapeŝto. La Kalendaro funkcias ekde 1996, kaj enhavas jare ĉ. 250 Esperanto-aranĝojn.

Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

Se vi ŝatus esti kunlabora membro en nia teamo, kontaktu nin: *Szilvási László*, szilvasi@eventoj.hu

Bonan vojaĝon, agrablajn travivaĵojn!

Ret-Info / Lingvo-Studio, LS <http://www.eventoj.hu>

Paĉoj al longa vivo (parto 3)

La vojo de tao-sekvanto estas malfermita al novaj spertoj, novaj ideoj kaj venturoj. Sed li ne estas egoista, koncentrita nur je profitoj, aŭ inklina pugnobati kiam aferoj ne progresas laŭ lia deziro. Estu simpla kiel infano, ne timu esti juĝita, ne timu erari, aspekti malsprita aŭ malsaĝa – kaj vi akiros la saĝecon de tao. Tamen konu la diferencon inter esti "infane simpla" kaj esti infaneca. Infano dum tuta tago rigardas la mondon kaj aĵojn sen alkroĉo kaj lasas ilin pasi. Tio estas unu el bazaj principoj de la mensa higieno.

Arto aŭskulti



Kutime, saĝaj homoj parolas malmulte. Ili ne bezonas laŭte demonstri siajn emociojn sed preferas vivi modeste kaj trankvile. Homo kiu scias, malmulte parolas. Kiu multe parolas, tiu nenion scias. Ni povas ĉiam lerni pli multe per sola observado ol per multaj demandoj. Fermu la buŝon, trankviligu viajn dezirojn kaj via vivo estos sana, plena de beleco. Ne subiĝante al lukso havi opiniojn pri ĉio, ni liberiĝas de senutilaj emocioj kaj kapablas harmonie fokusi je tio, kio plej gravas.

Parolu multe kaj miksiĝu en la mondaj aferoj kaj via vivo iĝos senespera. Se vi tamen sukcesos ne maltrankvili pro ies sentimentoj aŭ mondaj aferoj – tiam ĉiuj falsaj pensoj kaj vantaj imagoj malaperos, lasinte neniun spuron. Nuntempe ĉiu estas logita ĉion prijuĝi: kio estas ĝusta kaj kio erara, kio donas profiton kaj kio damaĝon, kiu verdiras kaj kiu mensogas. Multaj homoj fariĝas viktimoj de tiu premo kaj tial neniu rimarkas ke tio estas malsano subfosanta socian pacon. Ne eblas kontroli la mondon en kiu ni vivas. Ni ne povas eĉ kontroli eventojn kiuj aperas survoje de nia vivo. Tamen ni povas decidi pri niaj reagoj. Kaj tio estas nia vera forto. Pardon al dialogo malfermas ne parolo, sed aŭskultado.

Obstakloj aperas ofte ĉirkaŭ ni kaj ili ĉiam nin akompanas. Kiuj intencas serĉi malkonsenton, facile ĝin trovas. La sekreto por superi emociojn kuŝas en mola reago al abrupta forto. Tiumaniere la atakinto falas en vakuon kaj vaniĝas lia impeto.

Tia estas avantaĝo de fleksebleco, je kiu baziĝas la orientaj batal-artoj. Sed kiel ĝin apliki en la vivo? Se iu mokas pri vi, salutu lin per rideto. Kiam iu frapis vin, persistu en trankvilo.

Homo kapabla kontroli la emociojn, procedas laŭ sia vojo. Li scipovas atingi konkordon kaj facile trovas amikojn. Ĉe tia okazo, ankaŭ la kontraŭlo lernas foje de sia eraro.



Laozio (Lao-tsy) – kreinto de taoisma filozofio

Vivo ne disigeblas de suferoj. Tial oni konsilas akcepti ilin kiel parton de la vivo. Ni ĉiuj suferas. Sed kiam ni lernas trovi ĝojon malgraŭ suferoj, tiam ni malkovras profundan sencon de la vivo. Tao-saĝuloj memorigas, ke sufero povas utili kiel "piedbato" kiu forpuŝas nin el vojsulko de la ĝisnuna rutino. Ĝi povas mobilizi nian energion por grimpi pli altan ŝtupon. Ekzistas homoj, kiuj scipovas utiligi sian suferon kiel trezoron por difini noblajn celojn, ekz. per sia brava sinteno ili kuraĝigis la aliajn aŭ kreis ion valoran.

Historio montras, ke tiel naskiĝis gravaj ĉefverkoj en monda literaturo, muziko, pentroarto ktp. Ni menciigu almenaŭ kelkajn nomojn de L.Beethoven, F.Dostojevskij, V.van Gogh. Kaj kiom da kortuŝaj poemoj, romanoj, teatraĵoj kaj filmoj oni kreis pro seniluziĝinta /ne-reciprokita amo? En kristana religio, oni estas vokitaj ligi siajn suferojn kun Kristo kaj transformi ilin je ofero al monda paco, al solidareco kun la viktimoj de persekutado aŭ intence al animoj de siaj mortintaj proksimuloj. Tiam la homo trovas sencon kaj direkton por sia vivo.

Verŝajne multaj konas la diraĵon, ke suferoj skulptas karaktereojn kaj instruas saĝecon. Tiu vero ebligas nin ekvidi, la alian flankon: ke sufero povas fariĝi impulso al ŝanĝo kaj ilo por kreski. Nia vivo ne estas markita nur per suferoj, sed ĝi ankaŭ defias al plifortigo de la karaktero kaj al interna maturiĝo.

* * *


En la antaŭaj numeroj vi legis ke nia korpo kaj ĝiaj organoj bezonas movadon kaj nia menso – freŝan aeron. Longaj promenoj, gimnastiko kaj aliaj formoj de sporta aktivado tenos nin junaj.

Nuntempe, oni povas pli kaj pli ofte ekvidi grupojn de homoj kiuj gimnastikas frumatene en la parkoj.



Ankaŭ vi povas lerni pri la tradicia ĉina gimnastiko, ĉar pri tio aperis kelkaj ilustritaj libroj tradukitaj al Esperanto.

Ekzercoj de tai-ĉi plifortigos viajn korpon kaj sanon, igos vin pli serena, vigla, faciligos koncentriĝon. Ili fortigos vin psike, revenigos la emocian ekvilibron kaj preparos al krea laboro.



Sed por tion atingi, faru ilin malrapide, komplete kaj laŭ ritmo de profunda spirado. Fine, neniam forgesu gravan konsilon: plej bone efikas praktiko ofta kaj regula - pli bone 10 minutojn ĉiutage ol du horojn unufoje en semajno.

Fortoj de la vivo

Avino

"Amu viajn malamikojn" – tiu evangelia sentenco min ŝokis ĉar ankaŭ mi havas malamikon: mian avinon. Ni neniam ŝin vizitas pro iuj malnovaj miskomprenoj. Kiam mi ekaŭdis ke nia avino estas malsana, mi ekpensis ke necesas viziti ŝin. Miaj gepatroj estis surprizitaj ke mi ankoraŭ ŝin memoras. Post tiom da jaroj, la vizito ŝajnis al ili embarasiga. Tamen mi tien iris.

Enirante ŝian domon, mi rimarkis ke la familianoj estas mirigitaj pro mia vizito kaj traktas min malvarme. Tio estis malkuraĝiga, sed mi transpaŝis la sojlon. La avino dormetis kaj kiam vekigis, mi proksimiĝis al ŝia lito por saluti ŝin. "*Vi estas mia nepo, mi konas vin. Mi estas tre, tre feliĉa!*" – diris la avino kaj ĉirkaŭbrakis min. Ni ambaŭ ekploris pro ĝojo. Post mia hejm-reveno mi konvinkis la gepatrojn ke ankaŭ ili vizitu la avinon. Baldaŭ ni ĉiuj iris kune al ŝia domo kaj tiu renkontiĝo estis tre emocia. Ne pasis eĉ unu semajno kaj la avino mortis. (S.A. - Pakistano)

Tradukista laboro

Mi ĝojis, trovinte laboron kiel tradukisto ĉar ĝuste tiam mi tre bezonis monon. Tiutempe mia koleginino konfesis ke ŝi travivas malfacilan periodon pro ekonomiaj problemoj. Do mi proponis ke ni kundividu la taskojn, ke ŝi ankaŭ povu perlabori iom da mono. Tiel ŝi transprenis parton de miaj tradukotaj tekstoj. Ekzakte en la sama tago oni proponis al mi alian laboron, duoble pagatan kompare al tiu, kiun mi volis dividi kun mia koleginino.

E.M. (Azor-insuloj, Portugalio)

Séjour du 13 au 20 août 2016 à Métabief

dans le Massif du Haut Jura
avec ou sans stage d'espéranto

Lieu du séjour

“Les Sapins de l'Amitié” est un chalet pouvant recevoir 80 personnes (groupes, familles, ...) toute l'année.

Il est situé au centre de Métabief, station de moyenne montagne, près de la frontière suisse.

Vous serez accueillis par une équipe composée de salariés et bénévoles, qui veillera au bon déroulement de votre séjour, dans des chambres de 4, 6 ou 12 lits situées aux 1^{er} et 2^{ème} étages du chalet.

Une grande terrasse et un parc de 4000m² complète ce lieu.

Notre cuisinier prépare des plats de bonne qualité et propose aussi des menus adaptés à certaines demandes.

La vaisselle se fait à la main et en musique dans un esprit de convivialité entre vacanciers, et votre participation sera également la bienvenue pour la mise de table et le rangement de la salle à manger.

Les personnes qui souhaitent plus de confort peuvent réserver dans un hôtel ou un gîte et ne prendre que les repas de midi et du soir avec les autres stagiaires.

Les activités possibles (à décider en début de séjour)

- Découverte de la région: marche, VTT, voiture, télécabine. . .
- Activités nautiques au lac de Malbuisson: nage, pédalo, ... Parcours aventure. Bowling. Luge d'été.
- Visites: Fromagerie, distillerie, Thuyé (fumage des saucisses et jambons), Fonderie de cloches, Château de Joux, Maison de la réserve du lac de Remoray, Écomusée de La Chapelle des Bois, Site d'entraînement au biathlon et au saut à ski, Source et Saut du Doubs, Citadelle de Besançon, Salines d'Arc et Senans, Grottes de Vallorbe et bien d'autres encore.

Les cours d'Espéranto

Trois niveaux sont proposés:

- Débutant
- Perfectionnement
- Conversation


Déroulement du séjour avec cours

Samedi 13: Accueil l'après-midi, apéritif

Dimanche 14: Début des cours

Dans la semaine

- 8h- 8h45: Petit déjeuner
- 9h15-12h: Cours avec pause vers 10h30
- 12h30-13h15: Déjeuner
- 14h-17h: Activités
- 17h15-18h30: Cours d'Espéranto ou suite des activités
- 19h15-20h: Dîner
- 20h30: Soirée



Déroulement du séjour sans cours

Seules les heures des repas sont à respecter, un pique-nique peut être fourni pour le déjeuner.

Fin des cours et activités: vendredi soir



Bulletin d'inscription Aliĝilo

à renvoyer avant le 15 juillet 2016, après cette date majoration de 30€

à Anne-Marie Ferrier 20 rue de la Chesnaie 71530 Fragnes La Loyère Tél: 336 78 45 60 49

ou Vincent Gerbe 40 Chemin des Peupliers 69300 Caluire

Courriel: stagemetabief@orange.fr

| | |
|--|---|
| <p><i>Pour inscrire une famille, inscrivez chaque personne séparément</i></p> <p>Nom (familia nomo) : Prénom (persona nomo) :</p> <p>Adresse (adreso) :.....</p> <p>Pays (lando) :.....</p> <p>Téléphone (telefono) :avec code du pays</p> <p>Adresse courriel (retadreso) :</p> | <p>Hébergement du 13 au 20 août 2016</p> <p>Restado-kosto de la 13a ĝis la 20a de aŭgusto 2016 280€ 7 nuits par personne/ 7noktoj por unu persono</p> <p>Pour les personnes ne logeant pas au chalet Por la personoj sen tranoktado en la ĉaledo sed nur manĝoj 160€. 2 repas/jour par personne (2 manĝoj tage por unu persono)</p> <p>Participation au stage d'Espéranto 60€ Partopreno al la staĝo de Esperanto</p> <p>Adhérent CERL ou ASLC 30€</p> <p>Inscription après le 15 juillet (aliĝo post la 15a de julio) + 30€</p> <p>Total</p> |
|--|---|

L'hébergement comprend: la nuit, le petit déjeuner et 2 repas avec boissons.

La restado-kosto entenas: tranoktadojn, matenmanĝojn kaj 2 manĝojn tage kun trinkaĵoj.

Pratique alimentaire:

Je mange de tout Végétarien Végétalien Sans porc
 Mi manĝas da ĉio Vegetarano Vegano Sen porkaĵo

Pour les cours d'Espéranto, notez le cours suivi

Débutant Perfectionnement Conversation
 Komencinto Progresantoj Konversacio

Je paie 100€ à l'inscription et le reste pendant le séjour

Mi pagas 100€ ĉe la aliĝo kaj la ceteron dum la staĝo

Par chèque à l'ordre de CLAJ Métabief

Lieu.....

Date.....

Signature

Par IBAN

CA FRANCHE-COMTE LES HOPITAUX NEUFS 20071

Intitulé du Compte:

ASSOC. DES CLAJ SAPINS DE L AMITIE RJ
1 RUE DU TELESIEGE 25370 METABIEF

IBAN: FR76 1250 6200 7155 0067 7279 688

Code BIC Code swift: AGRIFRPP825

Comme motif du virement notez:

stage du 13 au 20 août 2016 et votre nom

Solvo de la paĝo14.

La helpanto certe estis fuŝkuniginte la montrilopartojn, la unuan fojon. Tiel la granda montrilo indikis la horon, dum la malgranda la minutojn, do inverse. Post du horoj kaj 10 minutoj la montriloj envere indikis la horon 8-10. La granda montrilo, rotaciante kiel hormontrilo, moviĝas malrapide de 12 ĝis 14 (2-00). La malgranda montrilo estigas du kompletajn cirklojn kaj 10 minutoj.

Post 13 horoj kaj 5 minutoj la situacio denove normaligiĝas. La granda montrilo moviĝos 13 horojn kaj alvenos laŭ direkto al la cifero 1. La malgranda estigas 13 kompletajn rotaciojn kaj 5 minutojn kaj alvenos al la cifero 7.



SOLVOJ de la Krucvort-enigma de la numero 173

Horizontale: 1.KOMPANANT. 2. NIKEL. ALEO 3.TRAGEDIIST. 4. AL. AKURATA. 5.BLT. OL. 6.OBEI. ESTRI. 7.NESTAĈ. RIS. 8.IST. KIAM. 9. STERADIAN. 10. MOGADIŜ. OK.

Vertikale: 1.ANTAGONNISM. 2. KIRL. BESTO. 3.OKA. BESTEG. 4. MEGALIT. RA. 5.PLEKT. ANAD. 6. DU. EĈ. DI. 7.NAIRIS. KIŜ. 8.ALIA. TRIA. 9.NESTORIANO. TOTALISM.

Momo, la Histriko de Catherine Hel kaj Elina Greiner

Momo, la Histriko estas dulingva ilustrita fabelo originale verkita en Esperanto kaj tradukita en la francan.

Priskribo: La 30-paĝa infan-rakonto enhavas originalan Esperantan tekston kaj ties tradukon en la franca sur la sama paĝo. La libreto entenas ankaŭ 15 originalajn kolor-riĉajn pentraĵojn por bele ilustru la aventurojn de la simpatia Momo la Histriko, ĝis neatendita kaj kortuŝa fino. La eldonon de tiu fabelo ebligis la loka asocio: Espéranto-Nancy (el Francio), kies anoj kune plenumis la tradukon, korekton, kaj engaĝigon.



Detalojn kaj kiel ĝin aĉeti:

La libro "Momo La Histriko /Momo Le Porc-épic" estas nune presata, sed ĝi estos havebla ekde julio. Ĉiuj povos mendi, aŭ rekte ĝin aĉeti ĉe nia budo en Fontenoy-la-Joûte, je la 14a de aŭgusto, aŭ en ontaj renkontiĝoj. 30 paĝoj el bonkvalita papero
Dimensioj: 21 x 21

Kostoj (sen afranko) :

13 € po 1 ekzemplero
11 € po ekde 3 ekzempleroj
10 € po ekde 5 ekzempleroj

**La sendokostoj aldoniĝos al la menciitaj prezoj.
Por pli da informoj retmesaĝu al la Libreservo.**

Por mendi librojn ĉe la Libroservo

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-dorsan mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net"
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
- Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"
IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97
BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn al jena adreso:

S-ro/S-ino

En

la

Subskribo:

Jubileoj

Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Bob Dylan** kaj **Joan Baez** - du legendaj kantistoj. Ili fariĝis la simbolo de tiu generacio, kiu pli aktive partoprenis politikon kaj kuraĝe protestis kontraŭ militoj. Tiam pli aŭdebla estis la voĉo de esperantistoj pri la neceso defendi lingvajn minoritatojn, pri kultura imperiismo kaj lingva demokratio. Dum la koncertoj, tiu muziko arigis dekmilojn da homoj kaj la kantoj diskonigiĝis en ĉiuj kontinentoj. Ankaŭ la esperantistoj ŝatis tiujn kantojn kaj kelkajn oni sufiĉe bone tradukis al nia Internacia Lingvo. Lerninte de la pasinteco, ni povas trovi inspiron al bonaj agoj nuntempe.

Inter la kantoj kreitaj de Dylan, verŝajne la plej grandan popularecon en la mondo atingis *Blovin' in the wind* (E-traduko: **Respondos la vent'**):

Kiom da vojoj laŭiru la hom'
Ĝis estos li hom' laŭ merit'?
Jes ja! Kiom da maroj laŭŝvebu kolomb',
Ĝis ĝi dormos sur strando kun fid'?
Jes ja! Kiom da fojoj plu pafos kanon',
Ĝis ĉesos por ĉiam milit'?


Rekantaĵo:

Respondon, amik', al ni blovas la vent'.
Respondon al ni blovas la vent'.

Kiom ĉielon rigardu la hom',
Ĝis vidos li pli ol la ter'?
Jes ja! Kiom oreloj plu taŭgas al li,
Ĝis aŭdiĝas plorad' de mizer'?
Jes ja! Kiom da mortoj konvinkos lin,
Ke tro multajn mortigis sufer' ?

Rekantaĵo:

Respondon, amik' . . .



Kiom da jaroj ekzistu montar',
Ĝis laviĝos al maro ĝi?
Jes ja! Kiom da jaroj ekzistu homgrup',
Ĝis rompiĝos malam-tradici'?
Jes ja! Kiom, turnante la kapon, povas hom'
Pretendi, ke ne vidas li?

Rekantaĵo:

Respondon, amik' . . .

La voĉo de Dylan, kun lia originala teksto: <https://www.youtube.com/watch?v=tSSjM6-fUFE>
En Esperanto kantis ĝin „Duo Espera” el Nederlando: <http://www.ipernity.com/doc/69959/14057129>


Nuna jaro abundas je "rondaj datrevenoj" en la E-movado. Sur la antaŭa paĝo vi legis pri la du famaj kantistoj, kiuj festas ĉijare la 75-an datrevenon de sia naskiĝo. En la sama jaro naskiĝs kelkaj tre aktivaj esperantistoj. Kun tiaj homoj nia internacia kulturo atingas pli altan nivelon kaj daŭros spite al obstakloj.

Torben Kehlet



Torben Kehlet (nask. 01 aŭg. 1941) – dana esperantisto, fondinto de **Eldonejo TK**. En jaro 1969, kadre de la serio "Oriento-Okcidento" aperis tie *Korano* – la ĉefa verko de islamo. La libro estis lukse eldonita, dulingva (paralele kun araba, apudis E-traduko) kaj ricevis tre pozitivajn reagojn inter la islamaj gvidantoj. Post kelkaj jaroj, Kehlet translokiĝis al Belgio kaj ekde 1975 daŭrigis laboron de la tre merita Eldonejo Stafeto* sub la nova nomo "TK Stafeto". T.Kehlet estis energia entreprenisto, kiu ne nur publikigis alktvalite kelkdekajn da libroj, sed helpis al konata E-revuo "Monato" ĉe ties komenco. Mi renkontis lin en Rotterdamo aŭtune 1976 kaj memoras, ke li estis tre eleganta homo. Tiutempe li vojaĝis al Brazilo por instalii radiostacion en la konata por-infana bieno "Bona Espero".

Dum la belga periodo de sia vivo, s-no Kehlet montriĝis unu el plej grandaj eldonistoj en postmilita historio de E-movado. Li atente observis teknikajn novaĵojn kaj kuraĝe ilin aplikis en sia poresperantaj laboroj. Certe per siaj talentoj kaj energio li povus multege fari por la E-movado sed mortis tro frue pro malsano, en majo 2001. Li estis delegito de UEA kaj ĝia dumviva membro.



Tre facila kaj bonhumora libro
pri la E-movado

Lia antaŭulo estis prof. Juan Régulo Pérez kies "Stafeto" en jaroj 1952-1975 publikigis 93 titolojn sur la hispana Tenerife-insulo. Entute, inter la multaj librojn troviĝas dudek aŭ eble pli monumentaj verkoj de nia kulturo. Ambaŭ eldonejoj (TK Stafeto kun sia hispana "patrino") iugrade gravas tiel en la esperanta historio kiel la mondfamaj "Larousse" en Francio kaj DK en Britujo.

D. Blanke estas membro de:

- Language Problems & Language Planning – LPLP (*Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado*)
- International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures – usona linvistika organizaĵo (*Internacia Bibliografio de Libroj kaj Artikoloj pri la Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj*).

Estas jam tradicio, ke dum la Universalaj Kongresoj oni okazigas Esperantologian Konferencon, kies kunfondinto estas Detlev Blanke. Li prezidis la unuan konferencon, kiu estis organizita dum la 63a UK en Varna, en jaro 1978.



Prof. Blanke multe kaj interese prelegas i.a. dum la Universalaj Kongresoj kaj estis invitata al Interlingvistikaj Studoj ĉe Mickiewicz-Universitato en Poznań. (La 3-jarajn studojn gvidas prof. I. Koutny ekde preskaŭ 20 jaroj kaj ĝis nun partoprenis ilin esperantistoj el 18 landoj <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/stabo.html>) /videblas la filmeto (6:21) - <https://www.youtube.com/watch?v=dNt4B0bHNDE> .

Mi memoras ke je nia invito, s-no Blanke helpis al grupo de germanaj infanoj veni al Internacia Skolta E-Tendaro organizita en Aŭgustova Lagaro, norde de Bjalistoko. Tio estis klaso el apud-Berlina urbeto, kaj la grupon gvidis ilia Esperanto-instruisto. Kun aliaj gejunuloj el Finnlando, Hungario, Bulgario, Jugoslavio kaj Hispanio ili travivis tre belan someron kaj plibonigis sian lingvokonon en Esperanto-kursoj, ĉiutage post matenaj ludoj. En freŝa aero la junaj partoprenantoj rapide lernis Esperanton, ĉar uzis ĝin praktike en la senperaj kontaktoj kun siaj alilandaj samaĝuloj. Ĉi tie vi povas vidi unu el prelegoj de prof. Blanke, titolita "Interlingvistiko - ĉu nur intelekta ludaĵo?" (47:04) – <https://www.youtube.com/watch?v=UwJg9lk-Ulw&nohtml5=False> . Se vi ŝatus lerni ion pri interlingvistiko kaj esperantologio, la ĝeneralaj informoj troviĝas en Vikipedio:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantologio>

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Interlingvistiko>

Miloslav Šváček

Ĉeĥa esperantisto M. Šváček (n. 02 februaro 1941) estas persista kaj kuraĝa aktivulo de la E-movado. Li estis longjara prezidanto de IKUE, helpis organizadon de katolikaj kaj ekumenaj Esperanto-kongresoj. Krom tio, S-no Šváček multe laboris por Esperanto en sia lando.




La tendaro en Sebranice, kiu povas gastigi ĝis 70 esperantistojn.

Kiam la situacio pliboniĝis, la sekvaj tendaroj denove povis okazi ekde jaro 1991. Por tio oni elektis novan lokon en pli granda kaj bele situita vilaĝo **Sebranice**, apud urbo Litomyšl. La partoprenintoj agrable rememoras tiujn somerojn: E-kursoj, ludoj, amikeca etoso, vespera kantado ĉe bivakfajro, ekskursoj en la regiono... Ekde multaj jaroj s-no Miloslav redaktas bele ilustritan E-periodaĵon "Dio Benu".

Sur la dekstra foto:

Granda amiko de Esperanto, Johano Paulo II ricevas la E-Meslibron de la IKUE-estraro. M. Šváček staras meze (en helgriza jako), apud li staras d-ro Antonio De Salvo kaj dekstre - p. Duilio Magnani. Romo, en septembro 1997.

**Rob Moerbeek**

Fine ni uzas ĉi tiun okazon por aldoni kelkajn vortojn pri la homo iom pli aĝa ol la supre menciita kvaropo. S-ro Moerbeek la 1-an de majo 80-jariĝas. Li laboris 32 jarojn kiel oficisto en la Centra Oficejo, zorgante pri la ekspedofako kaj de UEA kaj prizorgis ankaŭ Bibliotekon Hodler kaj la arkivon de la Centra Oficejo.



Rob Moerbeek edukiĝis profesie kiel filologo kaj dum 20 jaroj estis privatocento ĉe Amsterdama Universitato, kie li instruis Esperanton dum jaroj 1978-1989. Vizitante la UEA-oficejon en Roterdamo, mi havis la plezuron interparoli kun li kelkfoje kaj mi devas diri ke li apartenas al plej afablaj homoj kiujn iam ajn mi renkontis. Tiu ege modesta homo estas laborema kiel forniko. Dum jardekoj, s-no Moerbeek provlegis milojn da artikoloj en la monata *UEA-revuo* kaj en aliaj E-periodaĵojn. Do ne mirige oni povas nomi lin viva trezorejo pri E-movado, literaturo ktp. Li aktivis ankaŭ en la E-movado por handicapitoj, precipe blindaj. En lastaj n-roj de la monata UEA-revuo vi povas legi lian tre utilan lingvo-rubrikon. Post emeritiĝo en 2001, li plu laboras kiel volontulo en la CO. S-no Moerbeek estas honora membro de UEA kaj de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj.

* * *

Al ĉi tiuj meritplenaj esperantistoj, ni dediĉas du kantojn: *Gracias a la vida /Vivo, mi dankas vin*
<https://www.youtube.com/watch?v=rMuTXcf3-6A> (prezantas J.Baez kun la argentina kantistino M. Sosa).

La duan kantas ilia samaĝulo, Bob Dylan: https://www.youtube.com/watch?v=WH3_5cq5F_0&nohtml5=False
 Ĉu plaĉas al vi la gitara kaj buŝharmonika muziko en la fono?

La 68-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO 21. - 28. Majo 2016 en Bulgario

La ĉi-jara IFEF-kongreso okazis sur la balkana duoninsulo en Bulgario. La kongresejo troviĝis ĉe la bordo de la Nigra Maro proksime de Varna en ripoz-komplekso "Sanktaj Konstantin kaj Elena" kun vizitinda samnoma monaĥejo. La programo de la kongreso okazis en la domo de sciencistoj, kiu funkciis ankaŭ kiel hotelo. Pluraj esperantistoj loĝis en apudaj hoteloj malpli kostaj kaj pli bonaj. Kelkaj bulgaroj ĉeestis nur partatempe. La ĉefaj organizantinoj Peĵa Aleksandrova kaj Veselka Kamburova komisiis event-organizan oficejon, kies prizorgantinoj vere tre kompetente zorgis pri nia bonfarto kaj dum la tuta aranĝo ili ĉiam ĉeestis.

La kongreson partoprenis pli ol naŭdek esperantistoj el dek du landoj. Ĉeestis gastoj el Aŭstrio,



Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Pollando kaj Rumanio. Post la inaŭguro reprezentantoj de ĉiuj menciitaj landoj plantis diverskolorajn rozojn en la ĝardeno antaŭ la kongresejo. La rozo simbolas Bulgaron. Oni povas aĉeti vastan gamon de produktoj faritaj el ĝi; ĉefe parfumojn, kosmetikaĵojn, sed ankaŭ marmeladon, mielon, likvoron, diversajn dolĉaĵojn, memoraĵojn kaj vestaĵojn kun rozmotivoj. Ankaŭ en niaj kongres-sakoj ne mankis memoraĵoj kaj rozparfum-flakono en bele dekoraciita ligna ujo.

Agrabla surprizo atendis nin antaŭ la inaŭguro. Folklor-vestita kantistino Kalinka Raĉeva proponis al ĉiu alvenanto bulgaran panon kun spicaĵo kaj ĉiuj ricevis donace ceramikan ujeton kun Esperanto-surskribo por memori la kongreson. Ni tostis per la konata bulgara brando Rakija. Dum la inaŭguro, kiel kutime okazis paroladoj kaj salutadoj de unuopaj landaj asocioj kaj aliaj instancoj. Ne mankis festparolado de la prezidantino de IFEF Rodica Todor, kiu ĉe la fino malfermis la kongreson. Post tio ni fotiĝis antaŭ la kongresejo.

La temoj de la kongreso estis bone pritraktataj. Temis pri: "La fervojo de la estonteco" kaj "La lingvoj kiel rimedo". La programo enhavis kunsidojn de la IFEF-estraro, laŭ-temajn konferencojn, kunsidojn de la faka komisiono, fakprelegetojn kaj la plenkunsidon. Oni parolis pri movadaj aferoj, pri statut-ŝanĝoj. Kunvenis terminara kaj fake aplika sekcioj. Estis prezentitaj estraraj raportoj de la sekretario, redaktoro kaj kasisto. Por sekvaj tri jaroj ekfunkcios nova estraro, kiun oni surloke elektis. Verdire ne estis ŝanĝo, prezidanto daŭre estas Rodica Todor, sekretario Vito Tornillo, kasisto Laurent Vignaud, nur elektiĝis nova redaktoro Guido Brandenburg pro demisio de István Gulyas. Ne mankis alloga prezento pri la venontjara IFEF-kongreso en Colmar (Francio) kaj elekto de Pollando por la jaro 2018. Estis honorigitaj kelkaj elstaraj esperantistoj pro ilia poresperanta laboro. Restis tempo por promenoj en la ĉirkaŭaĵo, aŭ laŭ la marbordo. Tamen ne multaj kuraĝis bani sin en malvarma maro. Pluraj profitis sunan veteron por sunumado. La 24-an de majo Bulgaroj festas Kirilon kaj Metodon, inventistoj de la kirila skribo. Ni ĉeestis kaj spektis la paradon de diversaj lerneĝ-grupoj, sport-organizoj, intelektuloj, profesoroj, muzikistoj, maĵoretinoj, (uniformitaj knabinoj) maristoj ktp. Homoj bele kaj feste vestis sin, portante bulgarajn flagojn kaj florojn.





Infanoj svingis per flagetoj aŭ per koloraj blov-balonetoj. Adolekuloj portis kaj montris diversajn banderolojn aŭ portretojn de Kirilo kaj Metodo. El laŭt-parolilo sonis anoncoj pri ĵus preterpasantaj grupoj. Ambaŭflanke de la trotuaroj staris homoj aplaudante kaj svingante per floroj aŭ flagetoj. Bela suna vetero kontribuis al entuziasmo kaj ĝojo.



Ŝajnis, ke la manifestacio ne havos finon... ni pasigis tie la tutan matenon. La kongresaj vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programoj. Dum la Interkona Vespero kantis por ni la fama bulgara kantistino Violeta Balkanska kaj alia talenta kantistino Kalinka Raĉeva. Ankaŭ dum la nacia vesperoj ni ĝuis kantojn kaj folklorajn dancojn kaj kundancis. Alia danceblo prezentigis dum la Esperanto-vesperoj. Impona estis adiaŭa vesperoj kun festa vespermanĝo, kiu okazis en apuda bulgar-stila taverno "Kopitoto". Vigla muziko animis la vesperon kaj incitis al plua dancado. Dum la vespermanĝo ni spektis folklorajn dancojn kaj kantojn, viziton al amu-



za azeno kaj eksteran danckarŝon sur ardantaj karboj.

Okazis du duontagaj ekskursoj: al Varna kaj al Nesebâr. En Varna ni vizitis la pram-stacion kaj por-vizitantan centron kun maketo demonstranta la tutan komplekson.

Poste ni iom trarigardis la urbon kaj la ekskurso finiĝis en vinkelo, kie ni gustumadis kelkajn specojn de bulgaraj vinoj kun eblo aĉeti ilin. En Nesebâr ni admiris antikvan urbon, kelkajn preĝejojn kaj fortikaĵajn murojn. Ĉe la marbordo ni nutris mevojn.



La tuttaga ekskurso gvidis nin ĝardeno admirante belegajn multkolorajn rozojn. Impresis somera rezidejo "La palaco" de la rumana reĝino Maria kaj apuda minareto, de kie oni vidas la maron. Laste ni vizitis la kabon Kaliakra dum pluvega vetero. La postkongreso okazis en Veliko Tarnovo.



Dum la solena fermo estis transdonita la IFEF-flago al francaj reprezentantoj de la venontjara 69-a IFEF-kongreso okazonta de la 16-a ĝis la 23-a de majo 2017. **Ĝis revido en la pitoreska alzaca urbo Colmar.**

La 69-a kongreso de IFEF okazos de la 16-a ĝis 23-a de majo 2017 en Colmar



Tiu kongreso estas organizata kunlabore kun samideanoj de Colmar kaj Mulhouse. Jam fine de februaro 2016 okazis labor-kunveno kun la estraranoj de IFEF kaj membroj de Mulhouse-Esperanto en Colmar mem.

Diversaj taskoj inter IFEF-estraranoj kaj surlokaj esperantistoj estis deciditaj. En la programo de tiu kongreso estas planitaj pluraj ekskursoj en Alzaco kaj tute specife al la fervojista muzeo de Mulhouse.

Edmond Ludwig verkis plurajn tekstojn pri la proponitaj ekskurso-celoj al Riquewihr, Hunawihr, Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Kaysersberg, Eguisheim, kaj Strasburgo.

Aliĝilo kaj inform-prospekto estis kreitaj laŭ tiuj informoj kaj kun la nova logo-bildo kreita de Michel Basso.


Okaze de la 68a kongreso de IFEF ĵus okazinta en majo en Varna en Bulgario, jam estis disdonitaj la necesaj informoj pri la venontjara IFEF-kongreso en Colmar.

Intertempe Michel Basso kreis filmeton pri Colmar kaj la regiono, ĝi estas spektebla ĉe:

https://www.youtube.com/watch?v=Ffl_yW1np1s

Aliĝilo estas jam elŝutebla de nia retejo: <http://esperanto.france.est.free.fr>

Nia fototeko pri



**EUROMEDITERANEA
ESPERANTO
KONGRESO MARSEILLE
FRANCE 5-8/5/2016**

